

SVISA ESPERANTO - SOCIETO

INFORMAS

6/91

Koresp-adr: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich

Red-Telefono: 01/53 77 13

Novembro-December



La CENTRA KOMITATO de la Svisa Esperanto-Societo deziras al ĉiuj membroj solenan kaj benitan Kristnaskon kaj belan, sunplenan novan jaron 1992.

La redaktoro de "SES INFORMAS" ĝatas esprimi sinceran dankon al ĉiuj, kiuj skribe kontribuis al nia nova informilo. Mi antaŭĝojas pri tia kunlaboro ankaŭ en la nova jaro. -FL-

* * *

RETRORIGARDO

Valoras, de tempo al tempo rerigardi al la pasintaj monatoj. En mia kazo mi ŝatas turni mian rigardon reen al la unua eldono de la novstila informilo "SVISA ESPERANTO-SOCIETO INFORMAS". Estis por mi tasko enigi novan impulson en la SES-membraron kaj regajni la konfidon de ĉiu membro. Sendube ne facile, sed, kun kuraĝo kaj servopreteco al la membroj, mi dekomence estis optimista. Nature, ankaŭ se la informilo estas simpla, la necesaj laboroj tamen estas tempora-baj. Ekzemple la adresado de la kovertoj [adreso kaj sendinto], la elekto aŭ verkado de tekstoj, la skribado [malnete kaj nete], la kopiado, la faldado, kunmetado kaj enpakado ĝis la momento, kiam la finpreparita informilo forlasas la redaktoron, postulas seriozan agadon, se ĝi imponu al la legantoj. Tio estis dekomence mia devizo. En kiu grado mi atingis tion, pri tio juĝas la membroj. Jen kelkaj eĥoj: -FL-

...mi tre ĝojas, ke vi transprenis la redakta-don de "SES INFORMAS". Gratulon. -GE-

...mi feliĉe ricevis la "SVISA ESPERANTO-SOCIETO INFORMAS". Dankon. Ni bezonas samideanojn tiel sindonemajn kiel vi estas. -DB-

...mi ĝojas pri la lasta, tre bone verkita, SES INFORMAS kaj mi kore dankas pro viaj klopodoj. Domaĝe, ke tro longe mankis tia ligilo inter SES kaj la membraro. -EG-

...mi multe dankas al vi pro via grava laboro -AK-

...mi kore dankas pro la alsendo de la informilo "SES INFORMAS". Mi ĉiufoje legas ĝin kun intereso. La stilo plaĉas al mi kaj la enhavo estas interresa kaj leginda. -PB-

...mi denove gratulas vin pro via laboro pri la "SES INFORMAS", kiu regule aperas. -MG-

* * *

GRUPAJ INFORMOJ

REGIONA SEMAJNFINO ESPERANTISTA EN ITALLINGVA
SVISLANDO, 30 NOV - 1 DEC 1991.

Loko: [kongresejo] "Scuola Circolo Migros"
Via Pretoria 15, Lugano.

Organiza sekretario:
Dott. Tazio Carlevaro Viale Motta 32, 6500
Bellinzona. Tel: vespere 092/25 29 88.

LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO:

7.11.20.15h en rest. Simplon Habsburgerstr.16.
Ludoj kun F. Brügger kaj aliaj.
28.11.20.15h Vojaĝo tra historie gravaj lokoj
en USONO. Parolos Viktor Bieri.

ESPERANTOKLUBO WIL:

En restoracio Schweizerhof Unt.Bahnhofstr.18.
6.11.20.00h Temo elektota de Vreny + Charles.
5.12.20.00h (Ĵaŭdo) Nikolao-vespero, rememoroj
kaj amuzo.

ESPERANTO-SOCIETO ZUERICH:

11.11.19.00h MONATA KUNVENO en Karl der Grosse.
"Ankaŭ ŝakludo povas esti interesa".
Parolos la prezidanto.
9.12.19.00h JARFINA RENKONTIĜO en Karl der Grosse.
S-ro Weidmann parolos pri:
"LA TAGO DE LA LIBRO"

ESPERANTO-JUNULARO ZUERICH:

Renkontiĝo en la urba junulardomo Zürich (Dyna-
mo/Drahtschmidli) je la sekvantaj datoj:
25.11.19.00h kaj 30.12.19.00h

ESPERANTISTAJ GESTUDANTOJ ZUERICH:

Renkontiĝo je la sekvantaj datoj, ĉe D.Weid-
mann, Florastrasse 17, 8008 Zürich.
5.11.19.00h 12.11.19.00h 19.11.19.00h
26.11.19.00h 3.12.19.00h 10.12.19.00h
kaj 17.12.19.00h.

* * *

EDISTUDIO

estas eldonejo de Esperanto-libroj. Adreso:
Edistudio C.p. 213, I-56100 Pisa.

* * *

KIAM LERNI ESPERANTON? III.

Ekde junaĝo, kaj ankaŭ por 85-jaruloj, validas la regula sistemo, eĉ laŭ propra ritmo. Por strikte lerni la elementojn de la Fundamento, faru tiel: Faldu leterpaperon dufoje laŭ ĉiu flanko, kaj tranĉu la 16 pecetojn. Skribu dek el ili ĉiutage per vortoj aŭ eroj de la ekzerkaro, kaj sur la dorsa flanko la tradukon laŭ via lingvo. Lernu ilin atente fojon tage, rekte, kaj la sekvantan tagon dorsflanke, kaj krajone indiku per streketo bonan respondon, sed per punkto eraron aŭ forgeson. Semajnfine vi havos 60 paperetojn, sed jam pluraj havos tri streketojn ambaŭflanke. Forprenu ilin, kaj enŝovu novajn samnombre por resti ĉe 60 kiel regula tasko laŭ via ritmo. Tiam, alprenu du-tri frazetojn de la ekzerkaro, ĉar vi jam scias tiujn elementojn, kaj ekzercu vin eltrovi similajn frazojn pere de la aliaj radikoj jam lernitaj. Tion vi povas fari ĉu dum libera momento, ĉu marŝante, aŭ laborante en ĝardeno. Faru demandojn kaj respondojn kun vi mem. Se kolego lernas kiel vi, ambaŭ povas tuj interŝanĝi siajn provojn, helpi vin reciproke. Post duonjaro, vi scias ĉiujn elementojn, kaj sufiĉe da radikoj por paroli. Uzu tiam la duan duonjaron por kurtimiĝi skribi kaj traduki. Faru malnetojn de teksto, lasu ĝin semajnon en tirkesto, kaj reprenu ĝin; vi vidos tiam forgesojn aŭ erarojn. Faru ankaŭ tradukojn, eĉ duoblajn, por retrovi post semajno la tekston originalan. Se vi trovas libron de via lingvo, kiu havas esperantan tradukon, faru po dek liniojn da similaj ekzercoj. Krom novaj vortoj, parkeru tiam frazetojn apartajn, proberbojn, versaĵojn. Vi rimarkos ke la esperantaj elementoj de la frazoj estas sufiĉe klaraj kaj precizaj. Vi mem povos esprimi vin ĝuste laŭ via bontrovo, sen helpo de traduko aŭ imitado de alia lingvo. -RW-

* * *

Ne forgesu: "Kie estas volo, tie ankaŭ estas vojo". Tio validas ĉie, ankaŭ dum lernado de lingvo! -FL-

* * *

INTERESA LIBRO
RAPORTAS PRI LA PENSO, AGADOJ KAJ VIVO
DE EDMOND PRIVAT,
PREZIDINTO DE SVISA ESPERANTO-SOCIETO

Ofte membroj de SES esprimis sian bedaŭron, ke ne ekzistas biografio pri la granda esperanto-pioniro Edmond Privat, al kiu ni tiom multe ŝuldas ideoj kaj movadece. Nun, almenaŭ por la franclingvanoj, fine ekzistas tiu dezirata libro, kiu rakontas pri la vivo kaj atentigas nin pri la graveco de la penso kaj de la agadoj de la aŭtoro de **Vivo de Zamenhof, Historio de Esperanto, Esprimo de Sentoj en Esperanto, Interpopola Konduto**, ktp.

Anoncilo aldona al tiu ĉi numero de **SES informas** sciigas, ke eldoniĝis la doktoriĝa tezo, kiun Mohammad Farrokh dediĉis al Edmond Privat. Tiu interesa libro neniel timigu vin, ĉar fakte ĝi legiĝas kiel romano. Kaj la ĵus menciitajn verkojn de Edmond Privat, kiuj eble dormas en via libraro, ĝi instigos vin relegi, kun multaj aliaj libroj.

Vere ĉiuj legantoj de la franca nepre akiru tiun libron, eble kiel kristnaskan donacon por si mem kaj por la parencoj, amikoj, leteramikoj. Vere ricevinda kaj donacinda libro ĝi estas.

Aperis jam pluraj studoj pri Edmond Privat, sed ĝenerale ili neglektis lian esperantistecon. Mohammad Farrokh estis tro honesta por silenti pri esperanto. La Lingvon Internacian li lernis mem por trastudi la verkojn de Privat. Tiel li povis reale kompreni, kiel formiĝis la personeco de Privat kaj Hodler helpe de kontaktoj kun aliaj pioniroj.

Mohammad Farrokh ankoraŭ malkovrigas al ni, esperantistoj, kiom viglas la kontribuo de Edmond Privat al la vivo kultura kaj politika de Svislando. Tio grandigas homon, kiun ni jam konsideris granda pro lia sindono en la esperanto-movado.

Claude GACOND

LA TRI TUROJ DE LA URBO LAUSANNE

Kiel naskito en la urbo Lausanne, ĉe la bordo de lago ŝatata, mi deziras hodiaŭ rakonti iom el la urba historio. Estis en la jaro 1823. Tri civitanoj, bienposedantoj, Sinjoroj William Haldimand, Vincent Perdonnet kaj Charles C. Cerjat, faris strangan veton; konstrui, en la bienaj parkoj, la ŝajne plej malnovan turon. La venkanto estu tiu, kiu konstruos la plej ruinigitan turon, laŭ la aspekto. Tial kreskis en la bienoj de "Rovéréaz" (Cerjat), ĉe la supro de la urbo, de "Mon Repos" (Perdonnet) meze de la urbo kaj de "Denantou" (Haldimand) borde de la lago de Ouchy, tri turoj, kiuj aspektis tre malnovaj. Estis William Haldimand, kiu gajnis la konkurson, ĉar lia konstruaĵo ŝajnis esti la plej malnova. Du el la tri turoj estas ankoraŭ videblaj nuntempe. Ili estas tiu de la parko "Mon Repos" kaj tiu de la parko "Denantou". La unua situas, sufiĉe belaspekta, en la supra parto de la parko kaj staras supre de artefarita groto, je bordo de lageto. Akvo gutas tra la rokoj subtenantaj la turon. Hodiaŭ la du enirejoj estas muritaj. La dua, nun apartigita al la "Denantou", troviĝas en la oriento de la kajo de "Ouchy", en la proksimeco de la rivereto "Vuachère". Bedaŭrinde ĝia aspekto pitoreska foriĝis pro la enterigo ĝis la unua etaĝo, kiam oni konstruis la kajon. La trian, ĉe la bieno de "Rovéréaz" supre de la urbo, mi bone konis kiam mi estis knabo, ĉar kiel skolto mi ofte promenis en la regiono. Restis nur la piedo kun kelkaj ŝtonoj, superantaj krutan deklivon ĝis la rivero "Paudeze". Oni nomis ĝin "la turo de la Pendumito". Iom post iom la tereno disfalis kaj nun ne plu ekzistas tiu tria turo. -DB-

* * *

Ĉu la respondeculoj en estonta unuigita Eŭropo vere kredas, ke unu el la multaj naciaj lingvoj povos solvi la lingvan problemon, ne havante malfacilaĵojn aŭ eĉ kverelojn ?? -FL-

* * *

NOVAĴOJ EL KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

Kokona periodo estas transformata, ne dorma !

Pasintvintre KCE kokoniĝis. El ekstero iamaj gastoj povas imagi, ke ĉio dormas. Tute ne ! Librojn vendiĝas, la perkoresponda kurso funkcias, multaj leteroj alvenas kaj ricevas respondojn tujajn. Plie : ni labor-egas pri nova laborkoncepto, pri nova Direkta Komitato, pri 1992-a programo (18 tutsemajnaj seminarioj dumsomeraĵaj, pluraj semajnfinoj intereseĝaj, ktp).

Dum 1991 la Monata Cirkulero, oficiala organo de KCE, aperis regule dumonate. Bedaŭrinde mankis tempo por informado al enlandaj kaj eksterlandaj esperantistoj. Kiam estas mal-multe da kunlaborantoj kaj multe da laboro, oni sin dediĉas al la plej urĝaj taskoj. Informado fariĝis duaranga tasko. Feliĉe, s-ro Giorgio Silfer kaj s-rino Perla Martinelli informis vin ĉiujn pere de la revuo Literatura Foiro, nuntempa oficiala organo de SES. Tamen sciu, ke estas kelkaj eraroj en la tri paĝoj pri KCE, eraroj pri faktoj, kiujn la geaŭtoroj ne povis scii. Ne gravas, ĉiuj povas sin turni rekte al ni por pli preciza informado.

Ĉar KCE estas asocio, devas okazi en 1991 Ĝenerala Asembleo. Ĝi okazos la 15-an de decembro (la unuan de decembro estas regiona semajnfino en Tiĉino). Voĉdoni rajtas la apogantoj de KCE; tio estas la homoj, kiuj dum 1991 donacis fr. 100,- aŭ pli al KCE. Ili ricevas la Monatan Cirkuleron. Se vi ŝatus fariĝi apoganto de KCE, bonvolu uzi la poŝtĉekkonton 23-2921-8, kaj indiku "donaco al KCE".

Nia Monata Cirkulero de oktobro entenis ra-

portojn pri nia 1991-a laboro, pri la nova strukturo kaj la nova Direkta Komitato. Vi eble memoras, ke KCE naskiĝis la 15-an de decembro 1968. La Ĝenerala Asembleo de la 15-a de decembro 1991 estos vere la dua naskiĝo de KCE !!

La prezidantino de KCE

Mireille Grosjean

* * *

KOTIZO 1991, INFORMO DE LA ESTRARO

Pere de SES INFORMAS numero 5/91 ni sendis al la nekotizintoj enpagilon. Malgraŭ tio, ke ĉiuj regule ricevis SES INFORMAS kaj LITERATURAN FOIRON, bedaŭrinde intertempe kotizis nur malmultaj el la koncernatoj. Ni atentigas, ke la lasta kotiz-limdato estas

*** la 15-a de decembro 1991 ***

Post tiu dato, laŭ la statuto 23a, ĉesos la SES-membreco por la nekotizintoj.

Tute ne solventaj membroj turnu sin al nia prezidanto Claude Gacond aŭ al la kasisto.

Via kasisto E. von May.

* * *

DONACOJ: La estrarkore dankas por ĉiu financa kontribuo.

* * *

ANTAŬANONCO

* La ĝenerala kunveno de SES okazos la 14-an *
* de marto 1992, je la 11.00h, en Olten. *

* * *

Redaktfino de SES INFORMAS 1/1992 estas la 10-a de decembro 1991.

* * *